

I^pI

Informilo *por* Interlingvistoj

n-ro 111 (2/2020) ◆ 29-a jaro (tria serio) ◆ ISSN 1385-2191

*Eldonas: Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de
la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)*

www.esperantic.org www.facebook.com/esperantic @esperanticsf @esfacademic

ENHAVO

Bonvenon 3

Venontaj eventoj 4

UK en Montrealo movita al 2022	4
Edukaj eventoj de E@I en 2020	4

Raportoj 7

Gong Xiaofeng (Arko) donis kurson pri Esperanto enrete	7
Interreta Esperanto-kurso ekis ĉe la Artkolegio de Kunming, Ĉinio	7
Komuniko de la Estraro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj	8
Universitata agado – centra registro	10
Esperanto Por UN	11
Reto de kolektiva agado pri la lingvaj kaj kulturaj identecoj el Afriko	11
Premio Paul Gubbins	11
Supren kaj malsupren laŭ la skaloj: Bildigi la Esperanto-movadon ĉirkaŭ 1900	12
Seminario pri interlingvistiko kaj planlingvoj	13
Arkivkopio de <i>Internationale Plansprachen</i>	13

Libroj 14

Litova eldono de la biografia skizo pri Zamenhof	14
Ludwik Zamenhof: Okaze de la centa datreveno de la morto	15
Eduardo D. Faingold, <i>Language Rights and the Law in the European Union</i>	16
Nova serio: <i>Fach – Sprache – Kommunikation</i>	16

Artikoloj 18

Speciala interlingvistika numero de <i>La Ondo de Esperanto</i>	18
Alessio Giordano: artikolo en la <i>Itala Enciklopedio</i>	19
David Karlander, "Ideological indeterminacy: Worker Esperantism in 1920s"	19
Premio Albert Valdman 2019	20
Forum for International Research in Education (FIRE)	20
Speciala numero de <i>Quaderna</i>	20
Esperanto kaj la vera origino de la eŭro: la prezo pagenda por komuna identeco	20

Disertacioj 21

Mélanie Maradan, <i>Dealing with uncertainty in deliberate lexical interventions: A method for gathering data from a speech community, exemplified by Esperanto speakers</i>	21
Yasmin Raafat, <i>Sugar-coating Female Genital Mutilation in United Nations Documents in English and Arabic: a diachronic study of lexical variation</i>	21

Diversaj 22

100 jarojn post la morto de Hector Hodler: revuo <i>Esperanto</i> libere elŝutebla	22
ESF bonvenigas novan membron al sia Konsilantaro	22
Kronvirusaj intervjuoj	23
Intervjuo kun Martin Ptasinski	23
Novaĵoj pri <i>Militrakonto</i>	23
Ĉu vi konsideris eldoni vian laboron en LPLP?	24

Stipendioj de ESF 26

BONVENON

Bondezirojn de ESF. Ni ne dubas, ke vi ŝatus scii, ke ni daŭrigas nian laboron spite la ren-versojn de la kronviruso. Nia estraro regule renkontiĝas, kaj same nia administra komitato; nia ĉefdirektoro, Chuck Mays, diligente kunordigas nian agadon, kiel kutime. Kvankam laboro super kelkaj lastatempe aprobitaj subvencioj portempe haltis, aliaj antaŭeniras. Ekzemple, la Universitato William Peace, ricevinto de subvencio de ESF por kurso pri mondaj lingvoj, daŭrigas la kurson rete, kun helpo de ESF. Edukado.net, sub gvido de Katalin Kováts, plifortigis siajn klopodojn atingi la publikon, ekzemple pere de retaj intervjuoj kun Margaret Zamenhof, kuracisto en Parizo (kaj pranepino de L. L. Zamenhof) kaj kun Esperantista epidemiologo José Antonio Vergara.

Planoj kunveni en Belfasto, Nord-Irlando, kunlige kun la projekto de Michele Gazzola pri lingva justeco, prokrastiĝis; same la Nitobe-Simpozio, kiun ESF esperis organizi en Montrealo en aŭgusto, estis prokrastita ĝis la venonta jaro. Samo okazis al la Esperantologia Konferenco, pro nuligo de la Universala Kongreso de Esperanto.

La 30-a de aprilo estas nia venonta limdato por subvenciproponoj. Kvankam la falo de la borso forte limigis niajn disponeblajn rimedojn, ni tamen aprobos novajn subvenciojn se ni ricevos fortajn proponojn. Ja gravas, ke ni ne nur funkciu kiel kutime, tiel kiel ni povas, sed ankaŭ, ke ni utiligu tiun ĉi okazon por taksi nian progreson kaj serĉi novajn vojojn por antaŭenigi niajn celojn. Ni esperas, ke la subvenciproponoj, kiujn ni ricevos ĝis la 30-a de aprilo, respegulos tiujn prioritatojn.

Restu sanaj, sekuraj – kaj aktivaj!

Humphrey Tonkin
(prezidanto de ESF)

VENONTAJ EVENTOJ

UK en Montrealo movita al 2022

Pro la monda epidemio kaj neeblo okazigi la UK-on en Montrealo ĉi-jare, bedaŭrinde en 2020 ne okazos Universala Kongreso. La Universala Kongreso en Montrealo estas movita al la jaro 2022. La UK en 2021 okazos en Belfasto, Nord-Irlando.

Edukaj eventoj de E@I en 2020



Bonvolu noti, ke pro la kronviroza pandemio oni ne povas esti certa, ĉu ĉiuj eventoj ĉi tie listigitaj ja okazos. La Poliglota Kunveno jam reduktiĝis ĝis nurreta evento. Ni konsilas kontakti la organizantojn, se vi planas ĉeesti.

E@I okupiĝas pri diversa agado – unu el ili estas organizado de edukaj aranĝoj. Ĉi-jare atendas vin pluraj edukaj kaj ĉefe prilingvaj eventoj, organizitaj de E@I! Jen ilia skiza prezento:

Poliglota Kunveno (29–31 majo)



<https://www.polyglotgathering.com/2020/>

La unua evento estos *Polyglot Gathering 2020*, kiu pro la kronvira pandemio okazos en la reto. La intencita kunveno en Teresin, Pollando nun okazos en 2021. Tio estas unu el la plej grandaj kunvenoj de poliglotoj kaj lingvemuloj. Pasintjare partoprenis 654 homoj de la tuta mondo, kiuj parolas ekde 1 ĝis pli ol 30 lingvoj. La plej oftaj parolataj lingvoj estas la angla, la hispana, la germana, la franca, la rusa kaj Esperanto. La partoprenantojn atendas riĉa programo en diversaj lingvoj, inkluzive de prelegoj, diskutoj, praktikaj kursoj k.s. kaj amuziga vespera programo.

Somera Esperanto-Studado (18–26 julio)



ses.ikso.net

<https://ses.ikso.net/2020/eo/>

Tio estas ĉiujara semajna internacia lernejo de Esperanto por kaj komencantoj kaj progresintoj, kiu okazos la unuan fojon en Ĉeĥio, en la urbo Kroměříž. Dum sia 14-jara daŭro ĝi iĝis la plej granda somera Esperanto-lernejo tutmonde, kun 200–250 partoprenantoj el ĉirkaŭ 30 landoj. Dum SES okazos kursoj de Esperanto de ĉiuj niveloj, kurso pri Esperanto-literaturo kaj -kulturo kaj speciala kurso pri tradukado. Post la matena instruado okazos bunta taga kaj vespera programo.

Somera Esperanto-Programado



<https://sep.ikso.net/>

Paralele kun instruado okazos SEP, la unua en Esperantujo kodummaratono (angle: *hackathon*), kies celo estas krei funkciantan programaron fine de la evento. Dum ĝi programistoj kaj aliaj fakuloj de program-kreado, inkluzive de grafikistoj, projektmanaĝeroj kaj aliaj, intense kunlaboros por realigi komputilajn projektojn, utilajn por Esperantujo.

LingvaFest' (16–17 septembro)



<https://www.lingvafest.sk/eo/>

En septembro okazos LingvaFest' en Nitro, Slovakio, la unua kaj ununura internacia lingva festivalo en Slovakio. Unu el la ĉefceloj de la aranĝo estas proksimigi la riĉecon kaj buntecon de la lingvoj de Eŭropo kaj la mondo. La kerno de la programo estas duonhoraj fulmokursoj pri diversaj lingvoj, kiuj celas prezenti iun parton de la lernado de specifa lingvo, kutime la elparolregulojn, bazajn frazojn, specifaĵojn de la gramatiko k.s. Krom tio okazos aliaj pri-lingvaj prelegoj kaj kultura programo.

Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (1–4 oktobro)



<https://kaest2020.ikso.net/>

KAEST, okazonta en Modra, Slovakio, estas serio de seminarioj kaj konferencoj ekzercantaj scienc-teknikan aplikon de Esperanto. Ĝia ĉi-jara ĉeftemo estas “Scienco kaj tekniko kiel rimedoj por efektiviĝi daŭripovan evoluon”. La programo enhavos prelegojn (en du paralelaj blokoj – ĉeftemaj kaj alitemaj), trejnadojn, fakajn diskutojn pri scienco kaj tekniko kaj vesperan neformalan programon.

RAPORTOJ

Gong Xiaofeng (Arko) donis kurson pri Esperanto enrete

Se ne okazus la epidemio, studentoj revenus al sia universitato meze de februaro kiel kutime, kaj laŭ instru-plano instruistoj ekinstruus sian instruobjekton en klasĉambro. Ĉio ĉi estas disrompita de la subita epidemio de COVID-19, kiu ŝanĝis la ĉiutagan vivon preskaŭ de ĉiuj ĉinoj.

La 27-an de januaro, la Ministerio pri Edukado publikigis avizon pri la prokrasto de la printempa semestro de 2020 ĝis la unua de marto. Tio signifas, ke lernejoj ne rajtas rekomenci klasojn anticipe. Tre rapide diversnivelaj lernejoj eklaboras pri reta instruado laŭ la spirito de la Ministerio pri Edukado.

En nia universitato (Nanchang) hieraŭ estis la unua tago por reta instruado. Mi havas du studobjektojn por bakalaŭraj studentoj, kaj unu por magistras studentoj kunlaborante kun alia profesoro. Mia unua leciono okazos ĵaŭde posttagmeze – elektita kurso: Esperanto kaj internacia komunikado. 51 studentoj aliĝis. Mi jam alŝutis miajn PPT-ojn kun voĉo (mi uzis iun programon por filmi mian lecionon kun PPT kaj miaj klarigoj; studentoj povis spekti mian filmon). Krome, por eviti la malrapidecon de la ĉefpaĝaro, ni starigis grupon ĉe QQ (ĉina tujmesaĝilo) por la tuta klaso. Studentoj memlernas la enhavon ene de la semajno kaj nur diskutas dum la lecionhoroj.

Nova defio por ni instruistoj kaj ankaŭ por studentoj.

Prof. D-ro GONG Xiaofeng

Eblas legi pli pri tiu bela solvo al la problemo, kiu tuŝas nin ĉiujn, en *Internacia Pedagogia Revuo*, 2020 (2).

Gong Xiaofeng, konata en Esperantujo kiel “Arko”, naskiĝis en 1962, diplomiĝis pri kemio, poste doktoriĝis pri nutra scienco kaj laboras kiel profesoro pri media scienco kaj inĝenierado. Ekde la jaro 2004 ŝi ekinstruis Esperanton kiel nedevidan kurson dum kelkaj jaroj ĉe Nanchanga Universitato. Post kelkaj jaroj da paŭzo la nedevida Esperanto-kurso refunkcias ĉe la universitato de Nanchang ekde 2018.

Katalin Kováts lastatempe intervjuis ŝin: vidu pli ĉe “[Kronvirusaj intervjuoj](#)”.

Interreta Esperanto-kurso ekis ĉe la Artkolegio de Kunming, Ĉinio

Alessandra Madella informas, ke 85 gestudentoj sekvis la unuan lecionon de Esperanto fare de instruisto Liu Baoguo per komputilo aŭ poŝtelefono. La kurso daŭre estos instruata interrete, kun leciono ĉiumerkrede, ĝis la gestudentoj povos reveni al la Artkolegio.

Komuniko de la Estraro de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

Eventoj

La 8-an de marto 2020 la prezidantino Mireille Grosjean (Mirejo) sendis mesaĝon okaze de la Internacia Virina Tago. En ĝi ŝi substrekis la valoron de Esperanto kiel lingvo por justa egala internacia komunikado, inkluzive de virinoj. Notindas, ke la nuna estraro de ILEI konsistas el kvar virinoj kaj tri viroj.

La 21-an de marto okaze de la Internacia Tago por Elimino de Rasa Diskriminacio, estis dissendita komuna mesaĝo de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de ILEI, pri ebla rolo de Esperanto kaj de tiuj du organizaĵoj en solvado de tiu tutmonda problemo.

Fine de marto Mirejo dissendis tra la kanaloj de ILEI la Apelacion de la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj António Guterres rilate al la nuna monda situacio.

Mirejo devis reprezenti la Ligon ILEI en la kunsido de la Fondaĵo Esperanto-Urbo Herzberg la 7-an de marto. La vojaĝo estis nuligita pro la pandemio. Ŝi devis prelegi okaze de la Malferma Tago en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Vojaĝo nuligita: du prelegoj de Mirejo okazos per la reto.

Projektoj

Por la decembra Tago de la Libro “Komuna legado” Mireille Grosjean proponis poemon de Julia Sigmond, hungardevena rumana civitanino, emerita pupaktorino, konata Esperanto-verkistino, kiu mortis la 23-an de marto en norda Italio. Do, legado okazu omaĝe al ŝia poresperanta agado!

Kapabligo

Fine de marto estis dissendita la Gazetara Komuniko de UEA kun alvoko aliĝi al la projekto de ILEI kaj aliaj “Unu leciono pri Esperanto por ĉiuj lernejoj”. Ĉe la paĝaro de la Ligo troviĝas ĉiuj bezonataj instruaj kaj metodikaj materialoj en pluraj lingvoj. La persono, kiu prezentu la lingvon al klasoj, ne nepre devas esti esperantisto!

Universitata agado

https://www.ilei.info/agado/universitata_agado.php

Sukcese disvolviĝas kaj plikonkretiĝas laboro de la Laborgrupo pri universitata agado de ILEI/ESF/UEA/TEJO. La grupo planis kelkajn projektojn, kreis koncernajn subgrupojn kaj nomumis gvidontojn por ĉiu el ili:

- ◆ Kolektado kaj publikigado de unupaĝaj resumoj de sciencaj artikoloj pri Esperanto kaj interlingvistiko (Angela Tellier)

- ◆ Pliutiligo de la nove kreita formularo de edukado.net por registrado de universitataj kursoj (Katalin Kováts, ILEI)
- ◆ Manlibreto pri esplorado de homa konduto (Vicente Manzano Arrondo)
- ◆ Esploro pri universitatnivela instrulibro pri interlingvistiko (Renato Corsetti)
- ◆ Plimultigo de kursoj de Esperanto aŭ interlingvistiko (Renato Corsetti, ILEI) inkluzive de motivado per filmitaj intervjuoj kun sukcesaj instruistoj (Katalin Kováts)
- ◆ Studentaj Esperanto-klubo en universitatoj (TEJO)
- ◆ Rekreado de kolekto de la revuo *Simpozio* (Fernando Pita)
- ◆ Universitata agado en Afriko (Vicente Manzano Arrondo)
- ◆ Utiligo de la programaro *Open Journal Systems* por krei scian retrevenuon en Esperanto (Vicente Manzano Arrondo)

La ILEI-estraro prikonsideris tiun laboron kaj donis sian subtenon.

Pli detale eblas legi ĉe la paĝo https://www.ilei.info/agado/universitata_agado.php, kiun kreis kaj plu aktualigas Radojica Petrović (enhave) kaj Jozefo Nemeth (teĥnike).

Resumaro de la Scienca Konferenco en Ĉaĉak

http://ftn.kg.ac.rs/konferencije/lvc2019/BookofAbstractsLVC_final.pdf

Fakultato de Teknikaj Sciencoj en Ĉaĉak (apartenanta al la Universitato de Kragujevac, Serbio) publikigis en sia retejo trilingvan resumaron (ISBN: 978-86-7776-239-1) de la Internacia Scienca Konferenco: Lernado en Virtualaj Komunumoj, organizita de la Fakultato kunlabore kun ILEI, enkadre de la pasintjara 52-a Kongreso de ILEI, kun partopreno de esperantistaj kaj neesperantistaj fakuloj, ĉefe universitatanoj, el deko da landoj. La laborlingvoj estis la angla, la serba kaj Esperanto, kun sekva interpretado.

La prezentitajn prelegojn aprobis la Scienca Komitato, kiun kunprezidis Duncan Charters flanke de ILEI kaj Danijela Milošević, dekanino de la Fakultato. Kunprezidantoj de la Organiza Komitato kaj kunredaktoroj de la Resumaro estis Milica Stojković, asista profesorino de la Fakultato, kaj Radojica Petrović el ILEI.

Krom la prelegoj, en la konferenca programo okazis du atelieroj, kiujn gvidis Radojica Petrović:

- ◆ “La mondo tra infanaj okuloj”: IT kaj Esperanto en interkultura komunikado de lernantoj
- ◆ Enkonduka kurso: Esperanto por komencantoj

kaj diskutrondo, kiun gvidis Marija Blagojević, asocia profesorino de la Fakultato:

- ◆ Atingoj kaj limoj de instruado kaj lernado en virtuala medio

La resumaro estis katalogita kaj KD-e deponita ĉe la Nacia Biblioteko de Serbio. Mireille Grosjean disponigis paperajn versiojn al la arkivejo de ILEI en Herzberg, Germanio, kaj al kvar bibliotekoj, nome Biblioteko Hodler (Roterdamo), CDELI (La Chaux-de-Fonds), Kolekto de Planlingvoj (Vieno) kaj Esperanto-Muzeo (Zaozhuang).

Regule aktualiĝas la informo pri la universitata agado en la paĝaro de ILEI.

Venontaj kongresoj

Daŭras kontaktoj inter la Estraro kaj LKK pri preparo al la Kongreso 2021. Januare la Estraro definitive decidis pri la kongresloko por 2021: en Edinburgo formiĝis LKK kaj komenciĝas preparlaboro. La estraro devos baldaŭ decidi, ĉu ĝi sekvos la estraron de UEA irante al Kanado en 2022 por kongresumi. La gastigantoj en Kebekurbo esprimis sin pozitive pri tiu plano.

Revuoj

- ◆ Lastatempa ekzempla numero de *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR) estas libere alirebla vaste tra la tuta mondo.
- ◆ La unua numero de *Juna Amiko* (JA) 2020 estas libere elŝutebla de <https://www.ilei.info>.

Elena Nadikova
(sekretario de ILEI)

Mireille Grosjean
(prezidanto de ILEI)

Universitata agado – centra registro

<https://edukado.net/kursejo>

La laborgrupo pri “Esperanto en universitatoj” de ESF/UEA/ILEI/TEJO provas fari la registradon, kiun faris tra multaj jaroj Germain Pirlot. En tiu kadro edukado.net pretigis formularon por registri aparte universitatajn kursojn. Vi povas trovi ĝin en la kursejo ĉe la adreso ĉi-supre.

Instruantoj havos liberan aliron al la instrumaterialoj kun 900 ekzercoj.

Esperanto Por UN

Informilo 45 – marto 2020

<http://www.esperantoporun.org/dokumentoj/informiloj/informilo-de-marto-2020/>

De la Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:

- ◆ Studogrupo kaj Universitato Princeton prokrastis sian simpozion.
- ◆ Universala Esperanto-Asocio agnoskis la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo, la 21-an de februaro 2020, per alvoko al instruado en lingvoj, kiujn la lernantoj komprenas.
- ◆ UEA salutas la virinojn de la mondo, precipe la anojn de la tutmonda Esperanto-komunumo, okaze de la Internacia Virina Tago, la 8-a de marto 2020.
- ◆ La pandemio ŝanĝis la fokuson sed ne bremsis la Esperanto-movadon.

Reto de kolektiva agado pri la lingvaj kaj kulturaj identecoj el Afriko

<https://personal.us.es/vmanzano/AfrikaReto.pdf>

Projekto apogita de la Universitato de Sevilo.

Premio Paul Gubbins

https://www.monato.be/nova_talento.php

Okaze de la 40-jara ekzisto de *Monato*, kaj por memori sian forpasintan ĉefredaktoron Paul Gubbins, la revuo starigis la Premion Paul Gubbins por Nova Ĵurnalisma Talento. Ĉiujare, kaj tiel longe, ke restos mono en la fonduso kreita pro tiu ĉi celo, estos aljuĝata ĉefpremio de 250 eŭroj, dua kaj tria premioj de 100 eŭroj kaj sep senpagaj abonoj de *Monato*.


La temoj, inter kiuj la kandidatoj povas elekti, estas:

- ◆ La politiko, vivo, turismo aŭ historio de sia propra lando aŭ regiono
- ◆ Ekonomio
- ◆ Komputado
- ◆ Scienco
- ◆ Medio kaj ekologio
- ◆ Lingvo

Atentu, ke Esperanto-movado *ne* estas inter la temoj. *Monato* estas revuo en Esperanto, ne pri Esperanto. Antaŭ ol ekverki, indas demandi ĉe nova_talento@monato.be, ĉu la de vi elektita temo taŭgas por la konkurso. Tie vi povas ricevi ankaŭ ĉiujn pliajn informojn.

La kompleta regularo kaj eta afiŝo troviĝas ĉe la adreso sub la titolo de ĉi tiu artikoleto.

Supren kaj malsupren laŭ la skaloj: Bildigi la Esperanto-movadon ĉirkaŭ 1900



Up and down the scales: Visualising the Esperanto movement around 1900

Prelego pri Esperanto je la 27-a de februaro 2020 en la Universitato de Manĉestro, Anglio, de D-ro Bernhard Struck kaj Marcel Koschek de la Universitato de St Andrews, Skotlando

<https://www.digital-humanities.manchester.ac.uk/events/seminars-and-talks/>

Nia prelego enfokusigis la Esperanto-komunumon kaj -reton inter la 1890-aj jaroj kaj 1913/14, la unua generacio. Ni pritraktis la bezonon kombini transnacion historion kun spaca historio (geografia etendiĝo de esperantistaj retoj) kaj ankaŭ la flankon pri ciferecaj homsciencoj kaj nian labormetodon: de fontoj (listoj de esperantistoj kaj kongresaj ĉeestantaroj, ĝis kalkultabeloj kaj georeferencado de homoj), poste per QGIS en mapojn. Ni emfazis ankaŭ la bezonon aŭ eblon ekzameni la Esperanto-movadon laŭ diversaj skaloj – la monda, la nacia, la regiona, la loka kaj urba, la individua skalo – kaj kiel funkcii kaj moviĝi inter la skaloj.



Ni faris tion kun trinivela fokuso:

- ◆ Unue la internaciaj kongresoj 1905–1913 kaj ties geografia etendiĝo. En la prelego ni inventis la terminon *connectivity belt* (“konektozono”) inter Skotlando, la Angla Mezlando, la Rejn-regiono kaj ĝis orienta centra Eŭropo (kun tre aktivaj punktoj en Varsovio, Prago, Saksio kaj Bohemio).
- ◆ Marcel poste enfokusigis la polan movadon kaj la polajn esperantistajn kuracistojn je pola nacia nivelo, la varsovia nivelo, individuaj ekzemploj kaj la TEKA.
- ◆ Fine ni montris la situacion de Esperanto-ĵurnaloj antaŭ 1914 je eŭropa kaj monda niveloj.

Nin invitis D-ro Luca Scholz de la Universitato de Manĉestro kaj la seminario pri Ciferecaj Homsciencoj.

Seminario pri interlingvistiko kaj planlingvoj

<https://anneedeslangues.site.ulb.be/fr/agenda/esperanto-2-0-ulb-vub-a-new-post-brex-it-adventure>

La 21-an de februaro 2020 la Vrije Universiteit Brussel (VUB – Libera Brusela Universitato) organizis seminarion pri interlingvistiko kaj planlingvoj. Post enkonduko en la mondon de la planlingvoj, farita de D-ro Federico Gobbo el la Universitato de Amsterdamo, okazis fulmokurso kun la prezento de Esperanto kaj debato pri neŭtrala mondlingvo en kvar laborgrupoj.

Sesdeko da studentoj kaj docentoj ĉeestis la aranĝon. Ili aktive partoprenis la fulmokurson kaj poste havis interesajn demandojn. Ĝenerale la publiko reagis entuziasme al la aranĝo.

La 19-an de marto la Université Libre de Bruxelles (ULB – Libera Brusela Universitato) planis konferencon pri Esperanto.

Estas la intenco estonte organizi en ambaŭ universitatoj babilrondojn en Esperanto paralele al tiuj en aliaj fremdlingvoj.

Kristin Tytgat, VUB

Arkivkopio de *Internationale Plansprachen*

Detlev Blanke, *Internationale Plansprachen* (1985)

<http://d-nb.info/1206055073/34>


Laŭ informo de Klaus Schubert:

Montriĝis, ke en la dosiero, skanita laŭ mendo de la aŭtoro mem jam en 2003, mankis paĝo. Ni sukcesis persvadi la Germanan Nacian Bibliotekon, ke ni rajtu en ilia arkivservilo anstataŭigi la nekompletan version per kompleta.

Ĝi troviĝas de la ĉi-supra adreso, de kie ĝi estas daŭre senpage elŝutebla.

Litova eldono de la biografia skizo pri Zamenhof

<https://sezonoj.ru/2020/01/zamenhof-24/>



Ĉar en nacilingvaj enciklopedioj kutime estas nur unufraza mencio pri “pola lingvisto Ludwik (aŭ Ludwig) Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto”, ESF decidis eldoni modernan biografian skizon pri Zamenhof en kelkaj naciaj lingvoj. Laŭ komisiono de ESF ĝin verkis la Ruslanda ĵurnalisto Aleksander Korĵenkov surbaze de sia ampleksa verko *Homarano*, lanĉita en julio 2009 kadre de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko (la dua, korektita kaj ampleksigita eldono de *Homarano* aperis en 2011).

Aleksander Korĵenkov verkis sian skizon en Esperanto. En 2010 aperis ĝia angla versio, tradukita kaj adaptita de Ian Richmond, kaj sekvis la slovaka, itala kaj portugala eldonoj.

La 14-an de decembro 2019 kadre de la Zamenhof-Tagoj en Kaŭno (Litovio) estis prezentita la litova versio. La litovan biografion, presitan du tagojn antaŭe, tradukis el Esperanto Rimas Ŝuopys. Krom la biografia skizo de Korĵenkov, en la libro estas bibliografio, kolekto de eldiroj de eminentuloj pri Esperanto, du artikoloj de Vytautas Ŝilas (pri la restado de Zamenhof en Veisiejai kaj pri la fondo kaj la unua agad-periodo de Litova Esperanto-Asocio [LEA]), kaj artikolo de Povilas Jegorovas pri la centjara agado de LEA. La riĉe ilustritan 136-paĝan libron *Zamenhofas: biografine apybraiža* eldonis Monda Centro de Litovoj en Kaŭno.

En la festa prezentado de la libro Aleksander Korĵenkov rakontis pri siaj zamenhofologiaj studoj kaj pri la evoluo de la projekto de ESF, Rimas Ŝuopys parolis pri sia traduklaboro, kaj la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas klarigis pri la eldono de la libro.

36 ekzempleroj de la freŝeldonita libro estis aĉetitaj, kaj preskaŭ ĉiuj aĉetintoj profitis la eblon ricevi la aŭtografajn de la aŭtoro kaj de la tradukinto.

La litova estas la sepa lingva versio (inkluzive de la Esperanta originalo) de la biografia skizo de Zamenhof. Oni planas eldoni ĝin ankaŭ en la hispana lingvo. Interesatoj pri pliaj versioj skribu al Geoffrey Greatrex (geoffrey.greatrex@esperantic.org), kiu kunordigas la projekton en ESF.

Jam aperis:

- ◆ Esperante: Korĵenkov, Aleksander. *Zamenhof: Biografia skizo / Antaŭparolo* de Halina Gorecka. – Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: LEA, 2010. – 64 p.; 600 ekz.

- ◆ Angle: Korzhenkov, Aleksander. *Zamenhof: The Life, Works and Ideas of the Author of Esperanto* / Translation and notes Ian M. Richmond; Edited by Humphrey Tonkin. – New York: Mondial, 2010. – 114 p., il.
- ◆ Slovake: Korženkov, Alexander. *Život Zamenhofa: Život, dielo a myšlienky autora esperanta* / Slovenský preklad z esperanta a angličtiny Pavol Petřík; Úvod Peter Baláž, Humphrey Tonkin. – Partizánske: Espero, 2011. – 104 p., il.; 500 ekz.
- ◆ Itale: Korzhenkov, Aleksander. *La vita di Zamenhof* / Traduzione Cristina de Giorgio; Prefazione di Giorgio Novello. – Alghero: Edizioni Nemapress, 2017. – 140 p., il.
- ◆ Portugale: Korjenkov, Alexander. *Zamenhof: Vida, obra e ideias do autor do Esperanto* / Tradução e notas Fernando Pita. – Porto Velho: Temática Editora, 2018. – 196 p., il.
- ◆ Ĉeĥe: Korženkov, Alexander. *Ludvík Lazar Zamenhof: život, dílo, ideály* / Překlad z esperantského originálu Jindřich Košťálek; Předmluva Humphrey Tonkin. – Dobřichovice: KAVA-PECH, 2019. – 132 p., il.
- ◆ Litove: Korženkovas, Aleksandras. *Zamenhofas: biografinė apybraiža* / Iš esperanto kalbos vertė Rimas Šuopys; Straipsniai Povilo Jegorovo ir Vytauto Šilo. – Kaunas: Pasaulio lietuvių centras, 2019. – 136 p., il.; 300 egz.

Ludwik Zamenhof: Okaze de la centa datreveno de la morto

Aktoj de la kunveno en Romo, la 11-an de desembro 2017. Conferenze 141.

Roma: Accademia Polacca delle Scienze, 2018.

http://www.rzym.pan.pl/images/Conferenze_141_esperanto_ebook.pdf

http://www.rzym.pan.pl/images/Conferenze_141_italiano_ebook.pdf

Enhavo:

- ◆ Michela Lipari. Enkonduko.
- ◆ Fabrizio Angelo Pennacchietti. La Zamenhof-oj antaŭ Ludwik Zamenhof.
- ◆ Davide Astori. La soci-politika engaĝiĝo de Zamenhof.
- ◆ Nicola Reggiani. Zamenhof, Esperanto kaj la ideo de universala lingvo.
- ◆ Bernard Tuidier. Historio kaj tutmonda disvastiĝo de Esperanto.
- ◆ Javier Alcalde. Politikaj aspektoj en la historio de la Esperanto-movado.
- ◆ Carlo Minnaja. Monda literaturo en Esperanto, Esperanta literaturo en la mondo.
- ◆ Alicja Sakaguchi. Kriterioj por la konstruo de internaciaj planlingvoj.
- ◆ Ilona Koutny. De la planlingvo de Zamenhof ĝis nature disvolviĝanta lingvo: etapoj de la evoluo de Esperanto.
- ◆ Ida Stria. Vivanta lingvo. Ĉu ekzistas unueca bildo de la mondo de esperantistoj?
- ◆ Federico Gobbo. Cent jarojn poste: la Zamenhofa filozofio kaj Esperanto.

Eduardo D. Faingold, *Language Rights and the Law in the European Union*

Lingvaj rajtoj kaj juro en la Eŭropa Unio

(Palgrave Macmillan, 2020)

<https://www.palgrave.com/us/book/9783030330118>

Ĉi tiu libro ekzamenas la lingvopolitikon pri lingvaj rajtoj en la juro de la Eŭropa Unio kaj en la konstitucio kaj leĝaj statutoj de iuj membroŝtatoj de la Eŭropa Unio. En lastaj jaroj la Eŭropa Unio spertis plimultiĝon de postuloj por lingva rekono de minoritataj grupoj reprezentantaj konsiderinde grandan popolon (ekzemple la kataluna en Hispanio kaj la kimra en Britio). Krome, situacio evoluas rilate al la oficialo uzo de la angla en la Eŭropa Unio post la britelira voĉdono. Laŭ tiuj du kunteksto, ĉi tiu libro enfokusigas la gradon de jura protektado donata al lingvaj grupoj en la Eŭropa Unio. Ĝi interesos studentojn kaj klerulojn pri lingvopolitiko, EU-juro, minoritataj lingvoj kaj sociolingvistiko.

Nova serio: *Fach – Sprache – Kommunikation*

<https://www.uni-hildesheim.de/bibliothek/forschen-publizieren/universitaetsverlag/verlagsprogramm/schriftenreihen/fach-sprache-kommunikation/>

<https://hildok.bsz-bw.de/frontdoor/index/index/docId/1023>

Kiel vi sendube scias, la plej nova modo estas klerula komuniĝo sen samloka kunĉeestado. Ni laŭas tiun modon kaj fieras prezenti al vi nian novan libroserion *Fach – Sprache – Kommunikation*.

La serion eldonas nur rete Hildesheim University Press. Lastatempe aperis la unua volumo:

- ◆ Franziska Heidrich, Klaus Schubert (eds) (2020): *Fachkommunikation – gelenkt, geregelt, optimiert* [Faka komunikado – direktita, regita, optimumigita]. (*Fach – Sprache – Kommunikation* 1.) Hildesheim: Universitätsverlag.

Tiuj el vi, kiuj ankoraŭ [tiel!] ne legas la germanan, trovos iom da legaĵo en la volumo, kvankam la aperonta dua volumo en la serio eble pli taŭgos al via prefero.

Faka komunikado – t.e. direktita regita komunikado farata laŭ optimumigitaj metodoj – uzas metodike konscian perkriterian aliron kaj oni ofte reguligas ĝin per gvida interveno. Tio devus faciligi kaj do plibonigi kaj la produktadon kaj la akceptadon de fakaj komunikaj produktoj.

La transfaka plurdimensia kampo de faka komunikscienco konstante evoluas. Aldone al klasikaj esploroj pri terminoj, la diskutado estas hodiaŭ tre ampleksa. Ĉi tiu antologio kombinas ankaŭ alirojn al la tuta amplesko de moderna faka komunikscienco: de pritema komunikado en fakaj komunumoj por laikoj kaj interfaka komunikado en transfakaj projektoj, ĝis alirmetodoj por datenaroj kaj teksto-produktaj strategioj por verkistoj en profesiemaj postenoj, ĝis lingvistika lerteco en

kortumoj kaj la inkluzivo de apartaj celgrupoj en komunikado de komprenebleco kaj uzebleco de fakaj komunikaj produktoj.

La unua volumo estas preta por senpaga elŝuto ĉe DOI: 10.18442/087 aŭ de la adreso ĉe hildok.bsz-bw.de ĉi-supre.

Franziska Heidrich kaj Klaus Schubert

Speciala interlingvistika numero de *La Ondo de Esperanto*

<http://esperanto-ondo.ru/Ondo/Lo-293demo.pdf>



En marto 2019 aperis speciala numero (293) de *La Ondo de Esperanto*, dediĉita ĉefe al interlingvistiko kaj esperantologio. En la komenco de tiu numero estas publikigita intervjuo kun la prezidanto de la Akademio de Esperanto, Probal Dasgupta. Sekvas artikoloj de Věra Barandovská-Frank kaj Jens Stengaard Larsen pri interlingvistikaj projektoj kaj ideoj el la tempo, kiam Esperanto ankoraŭ ne ekzistis.

Kvar esperantologiaj artikoloj traktas temojn, ligitajn kun kelkaj aspektoj (ankaŭ pri la aspektoj!) de la Zamenhofa lingvo. Ilin verkis Haitao Liu, Sergio Pokrovskij, Carlo Minnaja kaj Jean-Luc Tortel. Fine de la lingva sekcio estas tri artikoloj pri interlingvistika kaj esperantologia agado kaj recenzo de la lasta numero de *Esperantologio / Esperanto Studies*.

La marta kovropaĝo, konforme al la enhavo, montras la centran parton de la komuna foto de la membroj de Lingva Komitato el la fora jaro 1907.

Pro la abunda lingvistika materialo tiu numero estis rekorde ampleksa – 95-paĝa; ĝi certe superus cent paĝojn, se enestus la kutimaj sekcioj “Tribuno”, “Kulturo” kaj “Mozaiko”, kaj se la movada sekcio “Eventoj” ne estus forte reduktita.

La demonstra versio de la interlingvistika *Ondo* estas elŝutebla de la adreso ĉi-supre.

El la enhavtabelo:

- ◆ Probal Dasgupta: Kalocsay kaj Waringhien ne hontus pri siaj posteuloj (Intervjuo de Paweł Fischer-Kotowski).
- ◆ Věra Barandovská-Frank. Komencoj de la lingvokonstruado en Eŭropo: Hildegard de Bingen kaj Athanasius Kircher.

- ◆ Jens Stengaard Larsen. La lingvoplanoj de Frederik Dreier.
- ◆ Haitao Liu. Kiel kvante lokiĝas Esperanto en homaj lingvoj.
- ◆ Sergio Pokrovskij. Aspektoj.
- ◆ Carlo Minnaja. La Akademio antaŭ la karaktero de la radikoj.
- ◆ Jean-Luc Tortel. Ludovika pretervido.
- ◆ Sabine Fiedler. Interlingvistiko kaj esperantologio: kelkaj spertoj el Germanio.
- ◆ Halina Gorecka. Planlingvistikaj konferencoj en Uralo.
- ◆ Paweł Fischer-Kotowski. Entombiga numero de *Esperantologio* (Recenzo: *Esperantologio / Esperanto Studies*, n-ro 8).
- ◆ Ilia Gnusarev. Studado en amika rondo.

Alessio Giordano: artikolo en la *Itala Enciklopedio*

Dum la lastaj monatoj Alessio Giordano, doktoro pri lingvistiko ĉe la Universitato de Pavia (Italujo), kaj perfektiganto pri neŭrolingvistiko ĉe la Universitata Instituto por Altaj Studoj IUSS Pavia (Italujo), verkis artikolon pri Esperanto, kiu estis disvastigata itale per la Instituto de la Itala Enciklopedio fundita de Giovanni Treccani [<http://www.treccani.it/>], la ĉefa itala institucio pri kulturo kaj kono. La verko ne estas enketo aŭ esploro, sed valoras pro la intereso, kiun la itala institucio pri kulturo montris rigarde al Esperanto.

La artikolo estis eldonita ene de la revuo *Enciclopedia Italiana*, en la itala.

David Karlander, “Ideological indeterminacy: Worker Esperantism in 1920s”

“Ideologia nedeterminiteco: Laborista esperantismo en la 1920-aj jaroj”
en *Language & Communication* (vol. 71, marto 2020, p. 95–107)
<https://www.sciencedirect.com/science/article/pii/S0271530920300033>

“Ĉi tiu artikolo ekzamenas ideojn pri Esperanto subtenitajn en la sveda laborista movado en la 1920-aj jaroj. Ĝi proponas klarigon de la lingvistikan–politikan praktikon de la Sveda Laborista Esperanto-Asocio (SLEA). La analiza fokuso koncernas la konceptadon fare de SLEA, ke Esperanto estas efektiva rimedo atingi socian, politikan kaj komunikan pliboniĝon. La ideologia malfermiteco donita de ĉi tiu ideo estas ero kun aparta intereso. En la praktiko de SLEA, oni rigardis Esperanton kiel rimedon kaj por venki kaj por gardi lingvan heterogenecon. La plibonigan kapablon atribuitan al Esperanto povis proprigi kaj la naciaj kaj la kosmopolitaj mondbildoj. La kunestado de tiuj du ideoj indikas fundamentan nedeterminitecon interplektitan en ŝajne rigidan ideologion de lingvo.”

Premio Albert Valdman 2019

<https://www.cambridge.org/core/journals/studies-in-second-language-acquisition>

<https://www.cambridge.org/core/services/aop-cambridge-core/content/view/225B9D0AF2D00284969E35240B83217D/S0272263119000214a.pdf>

“Ni ĝojas anonci, ke la gajninto de la Premio Albert Valdman por elstara eldonaĵo en 2019 estas ‘The role of language-analytic ability in children’s instructed second language learning’ [‘La rolo de lingvoanaliza kapablo en infana instruita lernado de dua lingvo’] de Karen Roehr-Brackin kaj Angela Tellier [Universitato de Essex]. Kune kun ni, bonvolu gratuli tiujn aŭtorojn pro ilia kontribuo al la revuo kaj al la studokampo.”

En la unua fazo de la esplorado, kvar grupoj da infanoj sekvis unu el kvar lingvoprogramoj: la itala, la germana, Esperanto, aŭ Esperanto kun kroma enfokusigo de gramatiko. Ĉiuj infanoj sekvis la saman lingvoprogramon en la franca en la dua fazo.

Forum for International Research in Education (FIRE)

<https://fire-ojs-ttu.tdl.org/fire/index.php/FIRE/issue/view/34>

Volumo 5, numero 3 estas speciala numero titolita *Policy and Practice in the Use of Non-Dominant Languages in Comparative Education* [Politiko kaj praktiko en la uzo de neĉefaj lingvoj en kompara edukado] kun gastredaktoroj Kevin M. Wong (Universitato de Novjorko, Usono) kaj Carol Benson (Instruista Instituto, Universitato Kolumbio, Usono).

Speciala numero de *Quaderna*

<https://quaderna.org/appel-a-articles/>

<https://f.hypotheses.org/wp-content/blogs.dir/6868/files/2019/04/Glottophobie-et-imaginaires-des-langues-appel-QuadernaN%C2%BA5.pdf>

Herman Deceuninck informas, ke speciala numero de *Quaderna*, titolita “Glottophobie”, pri lingvaj diskriminacioj estas en preparo.

Esperanto kaj la vera origino de la eŭro: la prezo pagenda por komuna identeco

https://www.elconfidencial.com/mundo/europa/2020-02-16/euro-origen-esperanto-verdadero-identidad-comun_2455816/

Ĉi tiu artikolo en la hispanlingva reta ĵurnalo *El Confidencial* intervjuas Germain Pirlot pri letero, kiun li sendis al la Eŭropa Komisiono en 1995, riproĉante ties prezidanton Jacques Santer pro priskribo de la estonta komuna valuto kiel “Esperanto-mono”, kaj proponante la nomon *eŭro*, kiu tiam oficiale adoptiĝis.

DISERTACIOJ

Mélanie Maradan, *Dealing with uncertainty in deliberate lexical interventions: A method for gathering data from a speech community, exemplified by Esperanto speakers*

*Trakti necertecon ĉe intencaj leksikaj intervenoj:
Metodo kolekti datenojn de parolkomunumo, ekzemplita de Esperanto-parolantoj*
<https://www.unige.ch/fti/index.php?CID=3864>

Jaŭdon la 21-an de novembro 2019 en la Universitato de Ĝenevo, Mélanie Maradan defendis sian doktoriĝan disertacion. Ŝi sukcesis kun la honorgrado “Très honorable avec les félicitations du jury”. Listo de juĝantoj troviĝas ĉe la ĉi-supra adreso.


Yasmin Raafat, *Sugar-coating Female Genital Mutilation in United Nations Documents in English and Arabic: a diachronic study of lexical variation*

*Sukerdolĉigi inan seksmutiladon en dokumentoj de la Unuiĝintaj Nacioj
en la angla kaj la araba: diakrona studo de leksika variado*

Magistriĝa disertacio, Universitato de Witwatersrand, 2017. La aŭtoro ekzamenas ekvivalentecojn kaj variecojn inter la terminaro pri ina seksmutilado en la ses lingvoj de la Unuiĝintaj Nacioj. disponebla en Academia.com.

100 jarojn post la morto de Hector Hodler: revuo *Esperanto* libere elŝutebla

<https://uea.org/revuoj/esperanto>



La 31-a de marto 2020 signis la 100-jariĝon de la morto de Hector Hodler. Tiu svisa esperantisto, kiu estis fondinto de UEA kaj motoro de la revuo *Esperanto*, sendube estas inter la plej gravaj laborintoj por nia afero. De la junulara agado ĝis bestoprotektado kaj la pac-problemo, de la nasko de pluraj iniciatoj ĝis la vasta kunordigo de la movado, sennombraj estis la kontribuoj de Hodler, kies vivo estis signifoplena por Esperanto. Omaĝe al li la aprila numero de la revuo estas libere elŝutebla ĉe la UEA-retejo. Legu pli: <https://uea.org/gk/859a1>.

UEA informas ankaŭ, ke eblas libere elŝuti ĉiujn jarkolektojn kaj numerojn de la revuo de pli ol antaŭ unu jaro, disponeblajn en la retejo de UEA.

ESF bonvenigas novan membron al sia Konsilantaro

<https://www.esperantic.org/eo/pri-ni/konsilantaro/>

<http://standrewstransnational.wp.st-andrews.ac.uk/research/esperanto-and-internationalism-c-1880s-1930/>

Bernhard Struck estas Lekciisto / Asociita Profesoro pri Moderna Eŭropa Historio ĉe la Universitato de St Andrews, Skotlando, ekde 2007. Li faris sian bakalaŭran diplomon pri historio, filozofio kaj politika scienco en Berlino kaj Lyon (Francio). Lia doktoreco estis komuna diplomo aljuĝita de la Teknika Universitato Berlino kaj la Université Paris 4 Sorbonne (2003).

Inter 2003 kaj 2006 li estis lektoro ĉe la Teknika Universitato Berlino kaj la Libera Universitato Berlino. Ĉe St Andrews li estis la fonda direktoro de la Instituto por Transnacia kaj Spaca Historio.

Liaj esploraj kampoj kovras la historion de vojaĝoj, landlimoj, historion de scienco kaj kartografio, la interrilaton inter klimato kaj teritorioj de la fino de la 18-a jarcento ĝis la komenco de la 20-a. Lia ĉefa geografia fokuso estas la germanaj landoj, Pollando, Francio kaj la ĉeĥaj landoj. Ekde 2019 li estas la ĉefa enketisto de la kunlabora projekto “Esperanto kaj Internaciismo, ĉ. 1880-aj jaroj – 1930”.

Kronvirusaj intervjuoj

<https://www.youtube.com/watch?v=QO47QP8Op98>



“Per nia 9-a kronvirusa intervjuo [ĉe la adreso ĉi-supre] ni vizitigos al vi Ĉinion kaj tie intervjuas Profesorinon Gong Xiaofeng, Arko, kiu laboras en la Universitato en Nanchang, kie ŝi gvidas Esperanto-kurson. Arko rakontas al ni pri unu el la plej grandaj ĉinaj universitatoj, pri tio, kiel tie komenciĝis la instruado de Esperanto, kaj kiel ŝi mem daŭrigis tiun laboron. Dum la kronvirusa pandemio la Esperanto-kurso okazas rete, kaj Arko estis petata lanĉi ankaŭ movadan Esperanto-kurson. En tiuj ĉi monatoj ŝi instruas rete ĉirkaŭ cent personojn.”

La tutan intervjuoserion fare de Katalin Kováts eblas rigardi ĉe <https://edukado.net/biblioteko/filmejo> (uzante la serĉvorton *kronvirusa*).

Intervjuo kun Martin Ptasinski

<https://edukado.net/biblioteko/filmejo?id=351>

Li diskutas la instruadon de Esperanto en universitatoj, en konversacio kun Katalin Kováts.

Novaĵoj pri *Militrakonto*

<https://mondmilito.hypotheses.org/newsletter-informilo>

La januara informilo de *Militrakonto*, esplorprojekto pri Esperanto kaj la Dua Mondmilito, sciigas pri la akiro de sonbendoj de intervjuoj kun diversaj soveta Esperanto-veteranoj kaj ligas al artikolo pri la gazeto *Latinigo*, kiu ekzistis mallonge de 1937 ĝis 1938 kaj pritraktis la latinigon de nelatinaj alfabetoj.

Ĉu vi konsideris eldoni vian laboron en LPLP?

Scienca revuo kun longtempa interfaka tradicio

<https://benjamins.com/catalog/lplp>

<https://benjamins.com/catalog/lplp.00029.edi>

https://benjamins.com/series/lplp/LPLP_InstructionsToAuthors.pdf



Kara kolego,

Jen atentigo pri *Language Problems and Language Planning* (*Lingvoproblemoj kaj lingvoplanado*, LPLP). Tiu kolege reviziita revuo, kun tri numeroj jare, unue aperis kun sia nun nomo en 1977, pro kio ĝi estas la plej malnova internacia scienca revuo, kiu eksplicite enfokusigas lingvo-politikon kaj -planadon. Eldonita de John Benjamins, LPLP ankoraŭ viglas post pli ol 40 jaroj (vidu detalojn ĉe la unua retadreso ĉi-supre).

En 2019, nova redakcia teamo envenis, kaj duono el la redakcia komitato anstataŭiĝis. La nuna konsisto de la redakciaj teamo kaj komitato kunigas klerulojn, kiuj jam de longe partoprenas la agadon de la revuo, kaj ankaŭ aliajn, kiuj ĵus aliĝis, certigante ekvilibron inter kontinueco kaj ŝanĝiĝo.

La principoj kaj celoj de la revuo estas prezentitaj en redakcia deklaro eldonita en numero 43:1 (2019) kaj elŝutebla de la revua retejo ĉe la dua adreso ĉi-supre. Tiu deklaro reasertas la trafekon de unu el la longtempaj ecoj de LPLP, nome ĝian interfakan orientiĝon. Laŭe la redakciaj komitato kaj ekipo enhavas kolegojn el granda amplekso da fakoj en la sociaj kaj homaj sciencoj.

Tiel la komunaĵo de aŭtoroj, kiuj eldonas en LPLP, estas ne aparta fako aŭ skolo, sed forta intereso pri lingva diverseco kaj la rilataj politikaj defioj. Tamen, pritrakti ilin postulas firme interfakajn alirojn. Tio igas lingvo-politikon kaj -planadon koncerna studobjekto ne nur por lingvistiko, sed ankaŭ por politika scienco, sociologio, geografio, ekonomiko, komerco, historio, psikologio, edukado kaj juro. La revuo do bonvenigas kontribuaĵojn el ĉiuj ĉi tiuj fakoj, kondiĉe ke ili enhavas fokuson pri lingvoproblemoj, lingvopolitiko aŭ lingvoplanado.

Ni ĉiuj scias tamen, ke akademiasaj institucioj ĝenerale ne subtenas interfakecon (malgraŭ idealismaj protestoj kontraŭe). Tio aparte evidentas en la ĉefaj sciencaj revuoj en la ortodoksaj fakoj. Ili tipe insistas pri kontribuaĵoj, kiuj sidas ene de longe establitaĵoj kaj uzas sanktigitajn konceptojn kaj metodojn. Tial kleruloj, kiuj laboras pri lingva diverseco el la

vidpunkto de alia fako ol aplikata lingvistiko foje spertas malfacilojn por eldonigi sian laboron pri lingvoproblemoj aŭ lingvoplanado en plej multaj revuoj en sia propra fako, ĉu politika scienco, ĉu ekonomiko, ĉu psikologio.

La kerna punkto de ĉi tiu mesaĝo estas do inviti politikajn sciencistojn, sociologojn, ekonomikistojn, psikologojn, geografojn, historiistojn, juristojn kaj aliajn aliĝi al aplikata lingvistiko kaj konsideri kontribui sian laboron pri lingvopolitiko al LPLP. Ĉi tiu invito eble aparte interesas kolegojn, kiuj trovas malfacile trovi, ene de sia propra fako, taŭgajn revuojn, kie iliaj zorge konstruitaj referaĵoj pri lingvopolitiko kaj planadaj problemoj povas senti sin kiel hejme.

LPLP bonvenigas kaj teoriajn kaj empiriajn esplorojn, inkluzive kvalitajn kaj kvantajn alirojn, kiujn ni rigardas komplementaj. Niaj kriterioj por elekto de artikoloj estas la rilateco de la temo al lingvopolitiko, la akreco kaj originaleco de la analiza vidpunkto, kaj la fortikeco de la metodo. La uzo de fakspezifaj konceptoj kaj metodoj estas bona; tamen ĉiuj aŭtoroj estas petataj klarigi ilin zorge kaj en maniero alirebla por legantoj venantaj de aliaj fakoj.

LPLP regule eldonas referaĵojn en la angla, la franca, la germana, la hispana, la itala kaj Esperanto, kaj de tempo al tempo ankaŭ en aliaj lingvoj. Ĉiu referaĵo estas eldonita kun tri resumoj (en la angla, Esperanto kaj alia lingvo, kiu spegulas la temo de la referaĵo).

LPLP aplikas normalan duoble blindan kolegiere reviziitan elektoprocedon. Krom la ĝeneralaj informoj disponeblaj en la retejo de la revuo, detala instrukcio al aŭtoroj estas elŝutebla de la tria adreso ĉi-supre. LPLP proponas ankaŭ “unue retan” eldonoprocedon: longe antaŭ la presita versio, artikoloj estas disponeblaj en la reto ĉe cifereca objekta identigilo (DOI) baldaŭ post sia akceptiĝo por eldoniĝo.

La redakcia teamo antaŭĝuas ricevi kontribuaĵojn, kiuj spegulas vastan amplekson da aliroj, aldonante al multe bezonata interfaka vidpunkto pri lingvoproblemoj kaj lingvoplanado.

*Prof. François Grin, Universitato de Ĝenevo
(Ĉefredaktoro, *Language Problems and Language Planning*)*

STIPENDIOJ DE ESF

Esperantic Studies Foundation havas du subvenciajn programojn: unu por Interlingvistika Subteno kaj alia por Ĝenerala Subteno.

Programo por Interlingvistika Subteno (IS)

Tio estas administrata de internacia komisiono sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi aljuĝas malgrandajn subvenciojn, kutime malpli ol 2000 usonaj dolaroj, por helpi fakulojn kaj jam spertajn studentojn plenumi esplorojn en la fakoj lingvoplanado, interlingvistiko, transnacia lingva politiko, lingva justeco, kaj planlingvoj (inkluzive Esperanton). La subvencioj povas subteni aĉeton de (aŭ aliron al) esploraj materialoj, partoprenon en konferencoj, vojaĝadon al esplorbibliotekoj, subtenon de surkampa laboro, evoluigon de retejoj, kostojn de publikigo, k.s. Subvencioj IS estas aljuĝataj konkurse kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo de la subvencio.

Programo por Ĝenerala Subteno (ĜS)

Tio kovras ĉiujn tri aktualajn prioritatojn de ESF: Esploradon, Edukadon kaj Konservadon. Ĝi estas malferma al individuoj kaj organizaĵoj, inkluzive de universitatoj. Subvenciojn oni aljuĝas konkurse. Kvankam plej multaj subvencioj estas malgrandaj kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo, foje subvencioj estas aljuĝataj por pli longaj periodoj kaj en pli grandaj sumoj. Antaŭ ol peti subtenon, estas konsilinde sendi mallongan mesaĝon al admin@esperantic.org, por demandi ĉu la propono taŭgas. Petoj ĜS estas traktataj de subkomitato de la Estraro de ESF. Petoj ĜS, kiuj tamen kongruas kun la gvidlinioj IS, estos plusendataj al la Komisiono IS.

Limdatoj

Ekzistas tri limdatoj ĉiujare por subvencipetoj, en ambaŭ ĉi-supraj programoj:

- ◆ 31 januaro
- ◆ 30 aprilo
- ◆ 30 septembro

Por pli da informoj, bonvolu viziti: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/stipendioj-de-esf>

Lastatempaj aljuĝoj

ESF ricevis entute 14 petojn pri financa subteno antaŭ la limdato je la 31-a de januaro. Dek unu estis rekte konsideritaj de ESF kaj tri estis konsideritaj de la komitato de CED. ESF ĝojas anonci subtenon de la jenaj sep projektoj.

Ĝeneralaj ESF-subvenciojn al:

- ◆ Somera Esperanto-Studado (SES) 2020 – EUR 2000
- ◆ Someras Esperanto-Programado (SEP) 2020 – EUR 1000
- ◆ Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (KAEST) 2020 – EUR 1000
- ◆ Irene Caligaris por “Socia Lingvistika Esplorado ĉe la Universala Esperanto-Kongreso en Montrealo” – EUR 3355
- ◆ Lernejo de Orientaj kaj Afrikaj Studoj en Britio por evoluigi eldonplatformon sub la titolo *Decolonial Subversions* – USD 500

Fonduso Interlingvistika Subteno aljuĝita de CED al:

- ◆ Sabine Fiedler, por ĉeesti la konferencon de la Internacia Federacio por Modernaj Lingvoj kaj Literaturoj en Vieno por fari prelegon pri Esperanto – USD 550
- ◆ Javier Alcalde, Bernhard Tuidier, Roberto Garvia, Stefano Evangelista kaj Guilherme Fians por partopreni la konferencon de la Konsilio por Eŭropaj Studoj por teame diskuti “Esperanto: pacisma ideo inter utopio kaj realeco” – USD 2000

ESF donis ankaŭ USD 10 000 al UEA por la Universala Esperanto-Kongreso 2020 en Montrealo por fortigi la kongresprogramon.

IþI estas eldonaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191. Paralela anglalingva versio, *Information for Interlinguists (IfI)* estas ankaŭ disponebla. Ĉi tiun numeron redaktis Simon Davies kun helpo de Angela Tellier. Por ricevi avizojn pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org. Limdato por la venonta numero: 30 junio 2020. Kontribuoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ la angla, aŭ ideale kiel la saman tekston tradukitan en ambaŭ lingvoj. ESF en la reto: <https://www.esperantic.org>, <https://www.facebook.com/esperantic>. Tvitero: @esperanticsf, @esfacademic.